

HUNGARLANDO - LA PLEJ GRANDA ANTROLOGIA MUZEO DE EŬROAZIO

El la tero de Hungarlando preskaŭ ĉiumonate estas elterigataj homaj ostoj, restaĵoj multcentjaraj, sed ofte eĉ multmilijaraj. Pri la riĉaj trovaĵoj de la hungara tero d-ro Lajos B a r t u c z , gvidanto de la Antropologia Instituto de la budapeŝta Eötvös Lorand Scienca Universitato jene rakontas:

Nia patrujo estas tre riĉa tereno de la antropologia esplorado. Nia plej malnova trovaĵo devenas el la mez-paleolita epoko. La ostorestaĵo proksimume 60 - 80 mil jaraĝa estis trovita en groto en la Heves-departemento antaŭ proksimume tridek jaroj. La trovaĵo estas per si mem tre valora. Ĉar ĝi reprezentas la neandertvalan homtipon, sed krome ĝi donas la certecon, ke ni povas trovi ankaŭ la restaĵojn de liaj samepokanoj. La kulturon de la prahomo vivanta en la fino de la diluviuma epoko oni trovis ĉe ni jam kelkaj viuma epoko oni trovis ĉe ni jam en kelkaj trovaĵ-teritorioj. Ankaŭ el la epoko de la polurita ŝtono, kaj poste el la kupro-kaj bronz-epokoj, niaj kolektoj enhavas jam multajn trovitaĵojn.

El la historiaj epokoj oni trovas preskaŭ sennombre homajn restaĵojn en nia lando. Aparta interesa afero estas ĉe tiuj trovitaĵoj, ke ili gardis por la esploristoj la karakterajn trajtojn de tre multaj popoloj, gentoj, homaj tipoj dum jarcentoj, eĉ dum jarmiloj. Se ni konsideras krom la ĉi tie ekloĝantaj aŭ tramigrantaj popolgentoj ankaŭ la aliajn, pli malgrandnombre ĉi tien venintajn popolanojn, ni povas diri, ke preskaŭ ĉiuj homtipoj de Eŭropo kaj Azio postlasis en la tero de nia lando en pli-malpli granda kvanto siajn postsignojn parte en tomboj, parte - pro la intermiksado de la loĝantoj - en la tipoj de la vivantaj homoj.

La ostoj konserviĝis relative en bona stato. La antropologia esplorado sur la teritorio de Hungarlando havas precipe tial - krom la multeco kaj diverseco de la trovitaĵoj - grandan signifon, ke ĝia tero - unuavice la sablo, sed ankaŭ la ŝlima kaj argila humoj - plej multloke eksterordinare bone konservas la ostarojn. Al tiuj du faktoroj ni povas danki, ke posedante en niaj kolektoj proksimume 20.000 ostojn precize difinitajn laŭ tipo kaj laŭ ilia aĝo, ni kuraĝe rajtas diri, ke nia londo estas la plej granda antropologia muzeo de Eŭroazio. Nuntempe eble en la tuta mondo nia lando disponas pri la plej grandnombra antropologia trovaĵ-materialo el la historiaj epokoj. Tio estas grava ne nur por la hungara antropologio, sed por la universala scienco, kaj samtempe ĝi pruvas la grandan internacian signifon de la hungara antropologia esplorado.

Kompilis P.B.